

Malkoloniĝo kaj la krizo de energio, 2a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 571, 1974.09.18 & 21

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Post la sendependiĝo de la afrikaj kaj aziaj koloniaj landoj en la jaroj sesdekaj la publiko en Okcident-eŭropo unue havis la impreson, ke la malkoloniĝo ne kondukis al tro gravaj financaj ŝanĝoj. Nur en la eksmetropoloj Belgio, Britio kaj Francio oni devis asimili centmilojn da nacioj revenintaj el la perditaj teritorioj kaj la industrio devis sin submeti al novaj komercaj kutimoj. Sed tio efektiviĝis paralele al la restrukturado de la internaciaj rilatoj en la kadro de la Komuna Merkato kaj de la Asocio de Libera Interŝanĝo. En ĉiuj okcident-eŭropaj landoj la kruda nacia produkto daŭre progresis ĉiujare de proksimume kvin procentoj aŭ eĉ pli. Tio kondukis la registarojn al vera eŭforio.

A.- Jam antaŭ la jaroj sepdekaj profetaj voĉoj avertis, ke tiu riĉiĝo ne estos eterna, ke ĝi povos daŭri nur tiom longe, kiam krudaj materioj povas esti aĉetataj tre malmulte koste. Sed la ekskolonioj restis dependaj ekonomike de la eksmetropoloj. La teknikaj helpoj estis garantiataj far la eksregantoj kondiĉe, ke ne okazu fundamentaj ekonomikaj ŝanĝiĝoj.

Cl.- Ĉar la vasta publiko ne konsciis, ke eble la situacio ŝanĝiĝos, neniuj registaro alportis ŝanĝon en sia politiko. Ĉio estis planita ĝis la krizo de la petrolo en 1973, kiel se tiu energifonto estos je ĉies dispono laŭ aĉetprezo daŭre malalta. La urboj etendiĝis ; la domoj altiĝis sen konsidero al la estontaj prizorgaj kostoj ; la politikaj konstruaĵoj : lernejoj, hospitaloj, naĝejoj, urbodomoj, kaj tiel plu, pli kaj pli aspektis palace ; same por la uzinoj ; ĉiam pli kompleta reto da aŭtoŝoseoj interligis la ĉefurbojn, kaj ĉe ties bordo kreskis mamutaj magazenoj, tio ofte en la kamparo.

A.- Paralele la sociaj servoj, la instru-sistemoj kaj la serĉ-institucioj estis perfektigitaj. Ili disvolviĝis kiel neniam antaŭe. Same estas koncerne la armeon kaj la armadon.

Cl.- La konsekvenco estas, ke en la industriaj landoj la ŝuldo de la publikaj instancoj senĉese kreskis. Ĉion oni ne povis entrepreni helpe de la impostoj kaj taksoj. La ŝtatoj kaj la publikaj instancoj ne plu kapablis bremsi la ritmon de siaj realigoj, kiuj pli kaj pli estis financitaj far pruntoj. Inter 1968 kaj 1972, tio estas en 4 jaroj, la ŝuldo de Italio ekzemple kreskis de 95 procentoj, tio signifas, ke ĝi preskaŭ duobliĝis. Jen tiurilate kiel kreskis la ŝuldo de la dek industriaj landoj kapitalistaj : Japanio estas la ĉampiono kun kresko de 135 % en 4 jaroj, sekvas Italio : 95 %, Svedio : 60 %, Usono : 45 %, Belgio kaj Svislando : po 42 %, Francio : 41 %, Nederlando : 38 %, Britio : 31 % kaj fine Germanio okcidenta : 28 %.

A.- Ŝtato povas sendanĝere kreskigi siajn ŝuldojn nur se daŭre kreskas la kruda nacia enspezo. Ĉiu scias, ke la pasintan jaron oni rimarkis, ke pro la energi-krizo tiu kresko ofte estis nula. Tiam la ŝuldoj ne plu povas kreski sen endanĝerigi la nacian monon.

Cl.- Kiu pruntas, tiu ŝuldas interezojn al la banko. Tio valoras ankaŭ por la ŝtatoj. En 1972 por Britio la ŝarĝo de la interezoj reprezentis 12 % de la publikaj elspezoj. Tiurilate Britio estas ĉampiono. Sekvas Belgio : 11 %, Usono : 9 %, Nederlando : 7 %, Italio : 5 %, Japanio kaj Svedio : po 4 %, Francio, Svislando kaj Germanio okcidenta : po 3 %.

A.- Tre verŝajne kiam la interezoj reprezentas pli ol 5 % de la elspezoj de ŝtato, tiu ŝtato troviĝas en kriza situacio kaj ĝia mono estas minacata. En 1972, tio estas antaŭ la energi-krizo, Britio, Belgio, Usono, Nederlando kaj Italio troviĝis en tiu malfirma situacio.

Cl.- Ankaŭ la ŝtata ŝuldo por loĝanto havas sian signifon. Tiurilate Usono estas ĉampiono: po 12'000 svisaj frankoj por loĝanto, tio estas po 4'000 dolaroj por loĝanto. 1 usona dolaro egalas al 3 svisaj frankoj. Jen la situacio en la aliaj ŝtatoj : due Britio : 9'000 frankoj, trie Belgio kaj kvare Svedio : 8'000 frankoj, kvine Nederlando : 7'000 frankoj, sese Svislando : 5'000 frankoj, sepe Italio : 4'000 frankoj, oke Germanio okcidenta kaj naŭe Francio : 3'000 frankoj, deke Japanio : 2'000 frankoj.

A.- Certe rilate al la ŝuldo por loĝanto Usono, Britio, Belgio kaj Svedio atingis krizan situacion.

Cl.- La plej grava komparo rilatas al la parto de la kruda nacia enspezo, kiun reprezentas la nacia ŝuldo. La plej drama situacio estas tiurilate tiu de Britio, kie la ŝuldo reprezentas 81 procentojn de la nacia enspezo. Sekvas Usono kaj Belgio : po 56 %, Nederlando : 47 %, Italio : 40 %, Svedio : 36 %, Svislando : 27 %, Germanio okcidenta : 17 %, Francio : 14 %, Japanio : 10 %.

A.- Jen per nombroj la financa situacio de industriaj landoj kapitalismaj fine de 1972, tio estas ĵus antaŭ la energi-krizo kaŭzata de la altiĝo de la aĉetprezo de la petrolo. Pri komunistaj landoj ni ne posedas statistikojn. Pri tiu krizo kaj ties ekonomika kaj psikologia signifoj ni parolos la venontan semajnon.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!